

**DIA REGNO**  
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 6 (891) • 2011 •

La kongresa grupo  
dum la kongreso en Poděbrady



## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; 📧 keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,  
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio  
☎ +420 325 615 651; 📧 polnicky@quick.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
📧 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Västergårdsg 15; 256 64 Helsingborg; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; 📧 dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
📧 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

Kaj la vorto fariĝis karno	123
KELI jubileas	127
Preĝo por ĉiu Tago	129
El Poděbrady	130
Kongresinte en Poděbrady	130
Elektoj – Amos	135
Protokolo de la jarkunveno	136
Henk de Hoog – Andreo Cseh 2	138
Kotizoj por KELI kaj Dia Regno	140
Informetoj	142
Krist – nasko	144

## REDAKTORAJ VORTOJ

Certe multaj el vi jam volis legi pri la somera KELI-kongreso, do ĉi-numere vi trovas iom pri ĝi. Sekvos pli da kongresaj artikoloj kaj certe ankaŭ fotoj en la printempaj numeroj.

Krom la kongresaj memorpecoj, vi ankaŭ trovas diversspecajn artikolojn. Unu el ili temas pri la Vorto, Logos, Kristo. Ni ĉiu-jare memoras pri Lia alveno, Lia estiĝo surtere, sed ĉu ni, pro tiu ĉiu-jara “ripeto”, ne riskas tro facile preterpasi ĝian signifon? Kion signifas tiu okazaĵo, ke “la Vorto fariĝis karno”, por vi, por mi? Legu kaj pripensu!

Nun finiĝas nia jubilea jaro, sed tio ne signifas ke mi ne plu volas publikigi viajn memoraĵojn de antaŭaj KELI-travivaĵoj. Do daŭre sendu al mi viajn rakontojn, longajn aŭ mallongajn.

Finfine mi kaj Pavel Polnický deziras al ĉiuj legantoj:

**belajn kaj benitajn  
kristnaskajn festotagojn!**

# Kaj la Vorto fariĝis karno

Prediko de József FARKAS, HU

Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero.

Johano 1:14

**M**iaj karaj gefratoj, se oni demandus min, kiuj estas la dek plej gravaj vortoj de Biblio, certe tiu ĉi vorto estus inter ili. Laŭ mia konvinko tiu ĉi vorto apartenas al la plej gravaj vortoj, precipe la unuaj kelkaj vortoj: “la Vorto fariĝis karno”.

Permesu al mi, miaj gefratoj, ke mi nun instruadu vin. Mi ŝatus ĵeti inter vin la semojn de la vero de nia Sinjoro, sciencon, teologian instruadon mi ŝatus doni al vi, pri tio, kial estas tiel grava tiu ĉi vorto, ke “la Vorto fariĝis karno”.

Ĉirkaŭ cent jaroj post Kristo vivis en la urbo de Efeso maljuna kristana viro, Johano, kiu estis unu el la plej grandaj geniuloj de kristanismo. Ni preskaŭ nenion scias pri lia vivo, sed liaj pensoj estas tie ĉi, antaŭ ni, en lia evangelio. En la antaŭaj jardekoj de sia vivo li travivis, ke la stafeta bastono el la manoj de judoj trairis al la manoj de grekoj. La disvastigado de la evangelio transprenis la grekoj, kaj tio estis grandioza evento. La judoj havis sian propran pensmanieron, vortaron, abstraktaĵojn, kaj en tiu ĉi ujo, en tiu ĉi vazo, en tiu ĉi kadro ili kunportis la evangelion, sed tiu ĉi ujo, kadro estis tute fremda por la

grekoj. Estis granda problemo, kiel eblus en la lingvo de la grekoj, en la pensmaniero de la grekoj diri la evangelion. Nun jam ni preskaŭ ne povas pritaksi, kiel granda paŝo estis: kiam la afero de la evangelio el la interpretado de la judoj trairis al la interpretado de la grekoj. Nur ke vi pli bone komprenu: la vorto Mesio estis la plej varmega vorto por la judoj, sed signifis absolute nenion por la grekoj. Tiuj ĉi vortoj, ke Moseo, Dekalogo, la monto Sinajo, sinofero, ĉefpastroj, Jerusalemo, sabato, la malpermeso manĝi viandon, ktp. estis tute nekompreneblaj en la mondo de la grekoj, kvankam origine en tiu ĉi ujo estis la evangelio.

... multe pensadis pri tio: kiel eblus diri la evangelion per iu nova maniero.

Do, ĉirkaŭ la jaro 100, en Efeso vivis tiu ĉi prudenta kristano, kiu travivis tiun ĉi ŝanĝon, partoprenis en tiu ĉi procezo, kaj multe pensadis pri tio: kiel eblus diri

la evangelion per iu nova maniero. Tiel, ke ankaŭ la judoj komprenu la novan, sed komprenu tion ankaŭ la grekoj, ĉar tiu ĉi nova evangelio estus en ilia lingvo. Kaj tiam naskiĝis la ideo, kaj tiu ideo estas lia tuta teologio, kiu estas en lia evangelio. Lia tuta evangelio estas en tiu ĉi frazo: la Logos, la Vorto fariĝis karno. La mirinda en tiu ĉi vorto – kaj kiu historie, teologie konas la situacion, preskaŭ genuiĝas antaŭ tiu ĉi vorto kaj adoras Dion – ke ekzistis komuna vorto, kiu ekmovis ankaŭ la koron de la judoj, kaj ekmovis ankaŭ la pensadon de la grekoj. Tiu ĉi vorto estis Logos. Tiun ĉi vorton multe amis la judoj (kvankam komprenis alie ol la grekoj), kaj multe amis ĝin la grekoj (kvankam komprenis alie ol la judoj). Tiel belege, kiel la gotikaj arkoj, aparte altiĝas al la ĉielo, sed en la pinto ili renkontiĝas: je tiu ĉi vorto la judoj kaj la grekoj renkontiĝis en tiu ĉi penso, ke la Vorto fariĝis karno en Jesuo Kristo.

En la malnova teksto ni aŭdas pri la manoj, okuloj, oreloj de Dio, Dio agas, venas – iras, proksimiĝas – malproksimiĝas.

Unue mi mallonge diras, kio moviĝis en la animoj de la judoj, kiam ili aŭdis tiun ĉi vorton, kaj poste mi diros, kio moviĝis en la animoj de la grekoj, kiam ili aŭdis tiun ĉi vorton.

Antaŭe mi devas diri, miaj gefratoj, ke la metodo de la pensado pri Dio estis

tute alia ĉe la judoj kaj ĉe la grekoj. Plej simple tiel eblas diri: la judoj ĉiam komencis ĉe Dio, kaj de tie ili malleviĝis al la tero. La grekoj male faris: esploris la aĵojn de la mondo, serĉis la elementojn, la finajn interrilatojn, kaj de tie ĉi ili leviĝis al Dio.

La modernajn judojn ĝenis tio antropomorfismo, ĉar ili jam ekkomprenis, ke Dio estas spirito, spirita estaĵo, kiu ne havas okulojn, manojn

Ankaŭ la historio de tiu ĉi vorto montras, ke kiam judo diris la vorton, montriĝis movo el supro suben, kaj kiam greko diris la vorton, montriĝis movo el subo supren. Kaj estas miraklo por mia pensado, tiu ĉi kuna movo, kaj tio, kiel en Jesuo Kristo renkontiĝas tiu ĉi vorto kaj en Kristo gloriĝas tiu ĉi vorto dirante, ke en Li fariĝis karno – la Logos.

Ni turnu nin al la judoj – mi iom simpligas, ĉar kompreneble estas pli komplika la afero, sed mi provas sumigi la esencon. Judoj de la tempo de Jesuo jam parolis en alia lingvo, ne en tiu lingvo, en kiu la sanktaj skribaĵoj estis skribitaj. La malnovan testamenon oni skribis hebree, sed la judoj en la tempo de Jesuo parolis aramee, ili legis la skribaĵojn tradukitajn al aramea lingvo. Interese, dum la tradukado el hebreo al arameo ankaŭ la juda pensmaniero evoluis. La vento de la greka filozofio enblovis en la fermitan mondon de la judoj, kaj la homojn, kiuj tradukis la

originalajn sanktajn tekstojn, jam ĝenis la t.n. antropomorfismo, la homeca figurado de Dio. En la malnova teksto ni aŭdas pri la manoj, okuloj, oreloj de Dio, Dio agas, venas – iras, proksimiĝas – malproksimiĝas. Tion ni nomas antropomorfismo, kiam ili montras, prezentas Dion kiel homon. La modernajn judojn ĝenis tiu antropomorfismo, ĉar ili jam ekkomprenis, ke Dio estas spirito, spirita estaĵo, kiu ne havas okulojn, manojn, sed kion ili faru, se en la sanktaj skribaĵoj estas skribita la mano de Dio kiu kreis la mondon? Do tiuj homoj, kiuj faris tiujn tradukojn (oni nomas ilin targum), forlasis tiujn antropomorfajn aferojn. Ili ne tiel tradukis, ke la mano de Dio kreis la mondon, ili tiel tradukis, ke la Vorto de Dio kreis la mondon. Kaj aperis centoj da vortoj, kiam la Vorto de Dio agis, kaj pli kaj pli granda kaj riĉa estis la signifo de “Vorto”.

Do nun jam ni povas kompreni, kia grandioza penso estis, ke tiu ĉi Vorto fariĝis karno en Jesuo. Por la juda pensado tiu ĉi Vorto estis komprenebla kaj ĉarma kaj kor-varmiga: la Vorto de Dio kreis la mondon, la Vorto de Dio proksimiĝis al sia popolo, kaj Vorto de Dio fariĝis karno en Jesuo.

Estas genia inspiro de tiu maljuna efesosa viro, kiam li alimaniere vortumis la sekreton de Jesuo – ne tion li diris, ke Jesuo estas ĉefpastro, kiel la epistolo al Hebreoj diras, ne tion li diris, ke Jesuo estas la ŝafo de Dio, kiel Johano la Baptisto diris. Kiam Johano sumigis la esencon, li diris, ke la Vorto fariĝis karno en Jesuo. Kaj en tiu ĉi esprimo eksonis la juda religia filozofio: Dio

estas nevidebla, netuŝebla, sankta, sed alproksimiĝas, serĉas kontakton kun la mondo, kaj lia alproksimiĝo estas la Vorto, kaj kiam la alproksimiĝo de Dio alvenis al sia pinto, tiam la Vorto fariĝis karno.

Kiel mi antaŭe diris, la grekoj de sube, palpadante serĉis Dion. Estas mirakla ĉarmo de la aranĝado de Dio, ke en la sama urbo, en Efeso, nur antaŭ pli ol 600 jaroj vivis unu el la plej gravaj grekaj filozofoj, Herakleitos, kiu havis kelkajn geniajn inventaĵojn. Herakleitos eldiris tiujn du vortojn, kiujn la homaro ne povas forgesi: panta rhei – ĉio moviĝas en la mondo, ĉio ŝanĝiĝas, formiĝas. Vi ne povas dufoje eniri en la saman riveron, se vi elvenis – tiam jam tiu rivero malaperis, kaj vi povas eniri nur en alian riveron, ne en la saman.

Estas logika ideo, sed venas multaj demandoj: se ĉio moviĝas, ŝanĝiĝas, transformiĝas, kiel eblas, ke ne estas ĥaoso en la mondo? Ĉiam ĉio ŝanĝiĝas, tamen la mondo restas sama. Kiel eblas? La mondo devas havi iun strukturon, kaj interne, en tiu ĉi strukturo okazas la ĉiama ŝanĝiĝo. Kaj Herakleitos diris, ke tiu ne-ŝanĝa strukturo de la mondo estas “logos”. Kaj la mondo ne nur simple moviĝas, ŝanĝiĝas, sed ankaŭ iras antaŭen, evoluas. Herakleitos diris, ke ankaŭ la evoluo ne estas ĥaosa, estas plano kaj ordo en la evoluo, kaj ankaŭ tiun ordon li nomis “logos” (de kiu venas la vorto logiko).

La tria rimarko de Herakleitos estis, kiel eblas ke la homo rimarkas tiun ĉi ordon kaj kruce kaj laŭlonge, kiel eblas ke la homo vidas la diferencon inter

bono kaj malbono, vero kaj mensogo? La respondo de Herakleitos estis, ke ankaŭ en ni mem, ankaŭ en la homo estas “logos”. Pro tio ni povas esti logikaj, ĉar la “logos”, la mistera dia ordo, kiu ekzistas ankaŭ en la ĉiama ŝanĝiĝo, estas ankaŭ en ni.

Kaj jen: tiuj du vidmanieroj renkontiĝis: la Vorto, la Logos fariĝis karno en Jesuo Kristo.

La Logos fariĝis karno – estis ĉarma por la judaj oreloj, ĉar estis konata penso, ke Dio estas spirito, la nevidebla Dio proksimiĝas, serĉas rilaton kun la mondo, kaj tiu ĉi Vorto, lia proksimiĝo kulminas, pleniĝas en Jesuo, fariĝas karno en Jesuo.

Ankaŭ en mi mem estas io, kio estas pli ol mi, estas io Dia en mi, estas “logos” en mi. La “Logos” de Dio estas en mi, la logiko de Dio estas en mi, Kristo estas en mi.

La grekoj komprenis la saman vorton tiel, ke en la mondo estas ordo, kaj la ordo fariĝis karno en Jesuo. La mondo iras al iu direkto, al la direkto de Jesuo. Ankaŭ en mi mem estas io, kio estas pli ol mi, estas io Dia en mi, estas “logos” en mi. La Logos de Dio estas en mi, la logiko de Dio estas en mi, Kristo estas en mi.

Kaj kiam tiu genia maljuna viro, en la sama urbo, en la jaro 100 post Kristo vortumis, ke la Vorto fariĝis karno – tiel unuiĝis la juda penso kaj la greka penso.

Al mi donas flugilojn, kiam mi pensas pri tio: dum la pensado, la serĉado de la vero, kiel Dio transdonis la stafetan bastonon el juda mano al greka mano. Ankaŭ la judoj komprenis, ke la vorto fariĝis karno. Ankaŭ la grekoj komprenis, kaj en ilia mano pli kaj pli riĉiĝis la vorto, en ilia animo pli kaj pli riĉiĝis la vero.

Miaj gefratoj, estus bone, se ni lernus vidi la mondon per tiu ĉi greka, pensema vidmaniero: oni serĉas la sekreton de la atomoj, la strukturon de la socio, la leĝon de la historio. Kaj ni kun kredanta koro dirus: ĉio, kio estas en “logos”, estas en ordo, fariĝis karno en Kristo. Jesuo Kristo estas la modelo de la kreitado, rigardante Lin elformiĝis la planedoj, elformiĝis la vivo sur nia planedo, kaj formiĝis la vivo al homa vivo. En Jesuo Kristo estas “logos”, kaj okazas la monda historio. Dia justeco, la Dia ordo fariĝis karno en Kristo.

Tiuj ĉiuj estas en tiu ĉi mallonga vorto: la Vorto fariĝis karno!

Ni bezonis du mil jarojn, ke ni komencu supozii la grandecon de tiu ĉi frazo. Tiu mistera ordo, leĝo, programo, kiu estas en la mondo, fariĝis karno en Jesuo Kristo.

Ni omaĝu Kriston, en kiu la Vorto, la Dia ordo, la Dia penso fariĝis karno.

Amen.

[Laŭ la prediko la 27an de decembro en 1974 de József FARKAS, hungara reformita pastoro, tradukis lia nepino Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS ]

# KELI jubileas

Prediko dum la KELI-kongreso en Poděbrady 3.8.2011

Philippe COUSSON, FR

Ĝoju en la Sinjoro ĉiam; denove mi diros: Ĝoju.

Filipianoj 4:4

Kaj kalkulu al vi sep sabatajn jarojn, sep fojojn po sep jaroj, ke vi havu en la sep sabataj jaroj kvardek naŭ jarojn. Kaj proklamu per trumpetado en la sepa monato, en la deka tago de la monato; en la tago de pekliberigo trumpetu en via tuta lando. Kaj sanktigu la kvindekan jaron, kaj proklamu liberecon en la lando por ĉiuj ĝiaj loĝantoj: jubileo ĝi estu por vi; kaj revenu ĉiu al sia posedaĵo, kaj ĉiu revenu al sia familio. Jubileo ĝi estu por vi, la kvindeka jaro; ne semu, kaj ne rikoltu tion, kio mem elkreskis, kaj ne deprenu la berojn de la nepritranĉitaj vinberbranĉoj. Ĉar jubileo ĝi estas, sankta ĝi estu por vi; de la kampo manĝu ĝiajn produktaĵojn.

Levidoj 25:8-12

**K**araj gefratoj, dum la preparo de tiu ĉi prediko, mi konstatis ke mia unua fadeno ne estis korekta: mi pensis ke estis etimologia ligilo inter jubileo kaj jubili. Sed tio ne estas vera. Tamen, mi ligos ilin. Mi do parolos pri jubileo kaj jubilado.

Unue, la vorto jubileo estas hebrea vorto, *joel*, kiu devenas de radiko kies unua signifo estas trumpetado. Jubileon oni ne nur disheroldu, sed propravorte distrumpetu.

Jen do, trumpetado sonu: KELI duafoje jubileas.

Sed, nun tute ne plu temas pri tiu eble neniam efektivigita sistemo por agrikultura societo. KELI ne estas tero, lando. Ĝin oni ne plugas, ne plukas, ne vendeblas dise en kampoj, ne aĉeteblas same. Neniu el ni vendiĝas al alia kiel sklavo.

Tamen, KELI apartenas al Dio, same kiel la promesita lando. Ni estas ĝiaj prizorgantoj. Ni devas fruktigi ĝin, ni devas vivigi ĝin. Tio estas nia respondeco, kiel komisiitaj servantoj.

Ĉu do ni ne devas ripozigi ĉi tiun jaron? Mi ne pensas, ĉar nur ne plu

temas pri agrikultura grundo.

Sed ni devas neniam forgesi ke nia afero ne estas nur nia, sed ke ĝi estas ankaŭ la afero de nia Dio. Pro tio, ni devas rememori ke ĉion kion ni ricevis de KELI ni ŝuldas al Dio kaj al lia graco. Komprenoble, ni ankaŭ multon ŝuldas al la antaŭuloj, al tiuj niaj pioniroj kaj batalantoj. Samtempe, ni devas danki al Dio ke li donis al ni ĝuste tiujn homojn.

Ni ankaŭ ne devas forgesi la celon, ne nur la celon kiun ni enskribis en nia statuto, sed ankaŭ la celon de Dio. Mi esperas ke ni kaj niaj antaŭuloj ne eraris kiam ili verkis tiujn tekstojn, kaj ke ili kaj ni bone komprenis la volon de Dio, nome disvastigi la Evangelion kaj vivi gefratan kunulecon, la batalo por Esperanto estante defendo de bonega rimedo por plenumi tiujn du celojn.

Ni legas en tiu ĉi ĉapitro de la libro de Levidoj, ke la jubilea jaro estas ankaŭ jaro de nuligo de ŝuldoj, jaro de elaĉetado. Tamen, mi asertas ke la ŝuldoj, kiujn mi ĵus menciis, ne apartenas al tiuj kiujn oni devus nuligi.

Inverse, ĝi estas ankaŭ dankada jaro, solenaĵo direktita al Dio. Solene sonas la trumpeto.

Tiu kongreso estu al ni solenaĵo. Ni do solene enpenetru en la historion de nia Ligo. Ni danku Dion pro tio kio jam okazis dum unu jarcento. Ni rememoru la strebojn, sukcesojn kaj malsukcesojn de niaj antaŭuloj kaj pioniroj. Ni ankaŭ danku pro tio kion ni jam vivis.

Ni estas nur ĉeneroj en jam jarcenta ĉeno. Unu venis post la alia. Ĉiu profitis la laboron de iu alia antaŭ li aŭ ŝi. Sed

ni ankaŭ pripensu ke nia laboro, niaj sukcesoj kaj malsukcesoj ankaŭ transiros al aliaj, kiuj same pluirigos la aferon al aliaj ĝis baldaŭaj jubileoj.

Tiu ĉi jaro estu al ni sankta, apartigita. Ĝi estu kaj retrorigardo al atingitaĵoj kaj ankaŭ rigardo foren al eblaj esperoj. Ni apogu nin sur tiu ĉi grundo de la antaŭuloj en la fido kaj espero al nia Sinjoro, al nia Dio, en la Spirito.

Sankta, apartigita estas tiu ĉi jaro. Apartigitaj estu ankaŭ ni. Konsekritaj estu ni. La graco kiun ni ricevis, la tasko kiun ni ricevas, tiuj apartigas nin, sanktigas nin. KELI ne estas nur nia afero, ĝi estas ankaŭ afero sankta, afero aparta, afero kiu rilatas al spirita agado, al Dia agado. Kaj en tio ni havas parton, ni ricevis mision, ni ricevis gracon, ni vivas en espero.

De tiu graco, de tiu vokiĝo, de tiu spirito vivis KELI dum unu jarcento. Tion ni distrumpetu. Tio estas nia jubileo. Tio estas la jubileo de Dio.

Niaj memoroj estas riĉaj je bonaj momentoj, sed ankaŭ plenaj je funebra malĝojo pro la malapero de kelkaj inter ni. Tamen, rilate al tiuj, ni povas simple kaj forte danki al Dio, pro tio ke li donis tiujn ĉi al ni. Funebro estas samtempe ĝojo kaj malĝojo. Malĝojo ĉar tiuj ne plu troviĝas inter ni. Ĝojo ĉar ili troviĝis inter ni. Ni scias ke ankaŭ per ili la Spirito de Dio nin akompanis.

Paŭlo tion sciis, kiam li diris al la Filipianoj: *Ĝoju*. Tion mi povus diri: Jubilu.

Tamen, krom la vortara diferenco, troviĝas ankaŭ alia diferenco: Paŭlo



diras: *Ĝoju en la Sinjoro ĉiam*. La jubileo alvenas nur dum specifaj jaroj, la ĝojo, la jubilo alvenu ĉiam.

Ĉu la jubileo devas ĉesigi la jubilon? Certe ne. Eĉ pli, la jubileo prifosas multajn kaŭzojn por jubili, por ĝoji. Ĉar nia kristana esperantista komunumo vivis jam unu jarcenton en la graco de Dio.

Ni distrumpetu tion. Dio kondukis nin kaj akompanis nin. Jubileu kaj jubilu!

Memorigo kaj pripenso estas bonaj. Laŭdo kaj danko al Dio estas bonaj. Sindediĉo kaj esperigo estas bonaj. Sed en ĉio ĉi tio, ni devas nepre ĝoji. Ĉar la amo de nia Dio estas ĝojiga, la espero kiun li donas al ni estas ĝojiga, la fido kiun ni ricevis estas ĝojiga.

En posta versiklo, Paŭlo aldonas al la Flipianoj vortojn, kiuj povus esti adresitaj al ni: *“Pri nenio trozorgu, sed pri ĉio per preĝoj kaj peto kun dank-esprimo viaj deziroj sciĝu al Dio.”*

Kompreneble, pro nia respondeco,

ni deziras bone pritrakti niajn aferojn. Ni volas prizorgi tiun mision kiun ni ricevis, kaj en tio ni pravas. Sed ni ne devas forgesi la limon inter zorgado kaj trozorgado, inter fido en Dio kaj fido en ni mem, inter peto kaj postulo. Niaj deziroj, se ni metas ilin en la manojn de Dio, ĉu ili koncernas nin mem, ĉu ili koncernas nian komunan celon, niaj deziroj estu ĉiam klaraj al Dio, kaj ankaŭ klaraj al ni mem. Ĉar ĉion ni ricevas de Dio, kaj la deziron kaj la eblecon agadi, kun la ĝojo plenumi lian volon.

Kaj pli poste la apostolo aldonas: *“Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardos viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo.”*

Paco, kun ĝojo: ĉu ne bela programo por kristana vivo, por kristana agado!

Paco kun ĝojo, tio estu nia sinteno pro tiu ĉi jubileo.

En paco kaj ĝojo, ni do distrumpetu:

**KELI jubileas!**

**Preĝo por  
ĉiu Tago**

la 3:an de aŭgusto

---

**P**atro en la ĉielo, eble hodiaŭ multaj samideanoj estas kune.

*Ili komprenu unu la alian.*

*Ili ĝoju en la kunestado.*

*Ili hejmenportu tiun ĝojon kaj semu ĝin en aliajn korojn, por ke la rikolto estu abunda.*

La libreton afable sendos al Vi sekretario P. Polnický

## El Poděbrady

Raportas Āke AHLRÉN, SE

**D**ank'al Dio, mi maljunulo povis partopreni ankoraŭ kongreson kaj plene ĝui ĝin. Kongresejo estis preĝeja domo en tre agrabla medio kun multe da florantaj arbedoj kaj altaj foliarboj. Kaj tute najbare fluis la rivero Labo (Elbo).

La inaŭguro okazis en la proksima urbodomo, sed krome ĉiuj programoj estis en la kongresejo kiu havis sufiĉe da salonoj, eĉ por matenmanĝo kaj distraĵoj. Eksterdome tie ni povis refreŝiĝi sur benkoj. Pli da korpa ekzercado ni ricevis promene 10 min laŭ la trankvile fluanta rivero al/de nia loĝejo, Pensiono Ostende ĉe la Vintra Stadiono (!), aŭ,



ankaŭ 10 min al la baneja domo MĀJ por tagmanĝo kaj vespermanĝo.

Ĉiam regis vere amika etoso. Jes, mi sentis min fakte kvazaŭ membro de granda, gaja familio, al kio kontribuis pli da junuloj kaj eĉ etuloj ol mi memoris de miaj pli fruaj kongresoj.

KELI havas estontecon!

---

## Kongresinte en Poděbrady

Raportas Bengt Olof ĀRADSSON, SE

**N**i bone hejmenvenis post nia KELI-kongreso en Poděbrady. Nia aŭto estis vere plenplena, ĉar ni kunportis ankoraŭ unu personon kun pakaĵoj. Sed kie koro granda sufiĉas loko malgranda.

Restas ankoraŭ en niaj memoroj la bona kaj familia etoso, gajaj kunvenoj kaj interesaj prelegoj. Sed precipe restas la memoroj pri unu-foje jaraj renkontiĝoj personaj kun geamikoj el disaj lokoj. Aparte interesa estis la vizito la

lastajn tagojn de indoneziaj esperantistinoj, kiuj post la UK en Kopenhago kaptis la eblecon viziti ankaŭ aliajn lokojn en Eŭropo.

Jam kelkfoje okazas ke la kongreso komenciĝas kelkajn tagojn post la UK por ke partoprenantoj en ambaŭ kongresoj povu trankvile vojaĝi inter la du lokoj kaj eble eĉ preterpasi la hejmon kaj ŝanĝi la valizon. Ĉi-foje la KELI-kongreso komenciĝis marde, la 2an de aŭgusto.

**Marde** ni alvenis en bona ordo al la kongresejo kiam la plejmultaj kongresanoj jam vespermanĝis. Estis granda ĝojo rekoni la plejmultajn vizaĝojn de la partoprenantoj. La bonkoraj bonven-salutoj kaj ĉirkaŭbrakoj de la aliaj varmigis nin. Nia ankoraŭ ne kvin-jara filo konstatis unu tagon: “Ni havas multajn geamikojn.” Tiu sento, tiu etoso estas por mi unu el la plej fortaj tiriloj por partopreni la KELI-kongresojn.

Do, kio okazis dum tiu semajno en

Poděbrady? Kion nia sekretario Pavel Polnický preparis al ni? La kongreso okazis tri-loke. Ni loĝis en apud-rivera hoteleto kaj per 5-10 minuta promeno laŭ-longe la rivero Labe (Elbo) ni atingis la preĝejon de la Ĉeĥofrata evangelia eklezio, kie ni havis niajn kunvenojn. Per ankoraŭ 5 minuta promeno ni atingis la manĝ-lokon. Tiel formiĝis triangulo. En la kongresejo ni matenmanĝis, kaftrinkis kaj tie eblis ankaŭ vespere postresti kaj iom babili malgrand-grupe.

**Merkrede** post la matenmanĝo ni promenis al la urbodomo por la solena malfermo de nia kongreso. Tie nin akceptis la urbestro L.Langr, feste ornamita. Pavel Polnický kaptis la okazon, kaj per la helpo de la urbestro kaj sinoda senioro Joel Ruml, dankis kaj Els kaj Sigfried pro iliaj multjaraj deĵoroj en nia KELI kiel sekretario (Els) kaj kasisto (Siegfried).

Post la malfermo ni reiris al la preĝejo por diservo. Unue bonvensalutis



kaj informis nin la loka pastro B. Baštecký kaj poste Philippe Cousson predikis pri la jubilo de KELI (vidu la predikon ĉi-numere).

Posttagmeze, en bela vetero, ni iom ekkonis Poděbrady per gvidata promeno tra la centraj partoj de la urbo. Gvidis nin Dr. Jana Hrabětová.

Dum monato aŭgusto okazis en Poděbrady ekspozicio “Ĉu Esperanto estas morta lingvo?” kaj post la promeno la kongresanoj partoprenis la inaŭguron. Sekvis la vespermanĝo, la interkona vespero kaj vespera preĝo.

**Ĵaŭde** okazis la tuttaga ekskurso. Ni vizitis Kutná Hora kun ĝia unike konservita historia urbocentro. En 1995 ĝi estis enskribita en liston de monda kulturheredaĵo de UNESCO.

Revenante ni uzis la eblecon veturi per mal-larĝrela sukerbeta fervojo ĉe Kolin.

Vesperpreĝon gvidis Éva Farkas.



**Dum promeno en Poděbrady ĉe Esperanto aleo.**



**El Indonezio: Endang Sabrina kaj Ilia Sondang**



**Vidindaĵoj en Kutná Hora.**



**Vendrede** ni prelegis aŭ aŭskultis prelegojn post la matena kantado. La unua prelego de Philippe Cousson temis pri la “ĉefurboj” de KELI (DR 5/2011).

Iomete eblis glaciaĵmanĝi post la tagmanĝo antaŭ ol komenci la posttagmezon kun prelegoj pri Heinrich A. Luyken (prelegis Ed Boorsboom) kaj pri kristana mistiko kaj mistikuloj (Siegfried Krüger). Bengt Olof Åradsson raportis mallonge pri “svedaj eroj”, pri personoj kaj okazaĵoj dum la lastaj jardekoj en Svedio. La raporto baziĝis plejparte sur la informo kolektita de Arne Lundkvist.

Vespere ni ĝuis gimnaziojn kiuj kantis kaj muzikis. Vesperpreĝon gvidis Gerhard Hofmann.

**Sabate** estis tempo por la jarkunveno de KELI. La protokolon vi povas legi aliloke ĉi-numere.

Posttagmeze ni aŭskultis laŭtleĝatan (far Pavel Polnický) predikon de em. pastro Vl. Hajský, “Kiu estas inter ni plej granda?” kaj poste pri la elstara hungara pentristo Mihály Munkácsy. Prelegis Ágnes Ráczkevy-Eötvös.

Vespere okazis “Kvizo por ĉiuj”. Gvidis Els van Dijk. Bengt Olof Åradsson montris malnovajn bildojn de antaŭaj kongresoj kaj la kunvenantoj helpis rememori konatulojn kaj travivaĵojn.

**Dimanĉe** ni kune kun la loka eklezio celebris dulingvan diservon kun sankta komunio kaj bapto. Esperante predikis Pavel Klimeš.

Posttagmeze la kongresanoj duontage ekskursis al Lysá n/Labem kaj Přerov n/Labem. Ne tro bela vetero sed la etoso tamen bona. Vespere ni denove ĝuis kulturen programon kun koncerto kaj operaj arioj. Kantis



Els v Dijk kaj Ed Borsboom



Supre: Pavel Klimeš.

Sube: dum la duontaga ekskurso



Kateřina Kudlíková kaj Miroslav Smyčka, pianludis Pavel Pichl

**Lunde.** Pro la forpaso de Jacques Tuinder oni aranĝis memormomenton honore al li. Pluraj partoprenantoj memorigis nin pri li kaj liaj agadoj plurloke.

Posttagmeze ni aŭskultis pri la “Naskiĝo de baptismo” en Rusio. Prelegis Viktor Gromov. Poste Ágnes Ráczkevy-Eötvös prelegis pri Ferenc Liszt – hungara komponisto – kaj aŭdigis konatajn komponaĵojn.

La kongreso jam daŭris unu semajnon. Rapide pasas la tempo en bona amika rondo. Lunde vespere estis tempo por la Adiaŭa vespero.

**Marde** ni jam matene enpakis la aŭton. Ne tute facila tasko. Sed finfine ĉiuj havis lokon por siaj aĵoj kaj piedoj. Ni adiaŭis unu la alian kaj iom post iom la partoprenintoj forlasis la kongresejon. Kelkaj, inter alie ni, restis kaj tagmanĝis kune sed finfine ankaŭ ni adiaŭis kaj komencis nian 6-horan vojaĝon hejmen.

Esperable ni renkontiĝos ankaŭ sekvontjare en germana Zöblitz.

[fotis Bengt Olof Åradsson, Ágnes Ráczkevy-Eötvös kaj Václav Pospíšil]

Karl Heinz Schaeffer dum la memormomento

Gerhard Hofmann



Dum la duontaga ekskurso

Dum vespera programo

Frances EASON, de Lowestoft, Orienta Anglio

**N**i devas esti respondecaj por niaj elektoj. Dio povus nin estigi similaj al surŝnurigitaj marionetoj tiel ni devus ami Lin. Sed li donas al ni liberan elekton ami Lin. La Sankta Biblio estas plena de rakontoj pri homoj kiuj elektis precizan vojon.

Amos loĝis en Tekoa en Jehuda ĉirkaŭ 750 aK. Li estis ŝafbredisto kaj ankaŭ figkulturisto kaj vendis ilin al siaj klientoj en la Norda Reĝlando. La situacio tie ne plaĉis al li. Sub la evidenta prospero, egoismo kaj avideco movis ĉiujn. Riĉuloj pasigis sian tempon manĝante kaj vintrinkante tro multe. La virinoj estis tiom malbonkonduktaj kiel la viroj. Amos rimarkis potencajn komercistojn kiuj ofte aĉetis perforte bienetojn de malriĉuloj por sanĝi en feriajn hejmojn.

Oni povis aĉeti justecon koruptante juĝejajn oficistojn. Tiel la malriĉuloj iĝis kulpaj kaj devis pruntepreni monon por pagi monpunojn eĉ uzante siajn mantelojn por garantioj kontraŭ la leĝo de Moseo. Ĉiuj zorgis nur pri si mem. Estis multe da malĉasteco por profitemo.

Ili celebris religiajn festojn sed nur surŝaf, simile al idolkulto. Ili forgesis ke La Interkonsentaj la eminentaj homoj havis ne nur privilegiojn sed ankaŭ respondecojn.

Dio diris al Amos ke li devis prediki al la personoj de la Norda Reĝlando.

Amos devis elekti ĉu obei Dion aŭ resti en sekuro. Estus komerca memmortigo! Li devus malplaĉi al siaj klientoj. Kiam oni sekvas Dion oni neniam scias kion oni devas fari. La vivo iĝas ekscita.

Amos estis tre lerta. Li enlistigis la kulpojn de la malamikoj de Izraelo. Poste, subite li deklaris ke Izraelo estis la plej malbona kulpanto. Li montris plumboŝnuron kaj diris ke Dio, la Ĉefkonstruisto, provis ilin kaj ili ne atingis Lian normon.

La humoro de la amaso ŝanĝiĝis. Estis tumulto. La pastro de la sanktejo sendis mesaĝon pri Amos al la reĝo kaj kriegis al Amos “viziovidanto, foriru!” Amos respondis “Mi ne estas profesia profeto, mi estas ŝafgardisto”. Do, li elektis fari tion. Amos profetis dum du jaroj kaj poste reiris hejmen por skribi la vortojn de Dio.

Ni ne scias pli pri li. Dio havis unu solan taskon por li.

Dio ofte elektas ordinarajn personojn, ofte maljunulojn por fari Lian laboron.

La situacio hodiaŭ fariĝis tre simila al la tagoj de Amos. Eble ni bezonas alian Amos por marŝi tra niaj stratoj por ekmovi kristanojn de komplezemo al agado.



# Protokolo de la jarkunveno de KELI

dum la kongreso en Poděbrady 6.8.2011

**L**a jarkunvenon partoprenis 30 membroj kaj 3 gastoj (listo de partoprenintoj ĉe la sekretario).

1. **Jarkunvenon malfermis**

Philippe Cousson per legado de kelkaj versoj el Psalmo 133 kaj ni kantis kanton 857 el Adoru.

2. **Elektado de kunprotokolantoj** – akceptitaj Els van Dijk kaj Sieglinde Stamm

3. **Aprobo de la programo** publikigita en Dia Regno

4. **Komunikoj** ne estas

5. **Funebra memorigo** – dum la pasinta jaro mortis fratinoj Barbro Gangemi (SE) kaj C. Preston (GB) kaj fratoj Alain Martin (FR), T. J. van der Veen kaj Jacques Tuinder (NL)

6. **Sekretaria raporto** estis publikigita en DR

7. **Kasistanoj** klarigis Siegfried Krüger kaj aldonis ke la membro-kotizoj ne plu kovras la elspezojn de Dia Regno, sed dank' al vendado de Biblio estas iom da gajno. Li rekomendis nian oferecon por

Adopta kazo kaj por Evidente. **Biblio:** Restas 500 el 1000, nun stokitaj en Aalen. Karl Heinz Schaeffer raportis pri la monkollekto de la ekumena diservo dum la Universala Kongreso en Kopenhago.

8. **Raporto de kaskontrolantoj** legis Karl Heinz Schaeffer. Ili trovis kontadon en la ordo kaj esprimas nian dankemon al kasisto Siegfried Krüger pro lia longjara laboro

9. **Ĉiuj raportoj estis aprobitaj**

10. **Pritrakto de la buĝetoj** – kontrolita por 2010 kaj diskutitaj proponoj por la jaroj 2011 kaj 2012 kaj poste akceptitaj. Estis donacitaj € 600,- por la Adopta Kaso. La bankkostoj de la nova CIC-banko estas € 36 kaj la rentumo de la ŝparkonto 2,5 %.

11. **Pri nia gazeto Dia Regno** parolis redaktoro B. O. Åradsson. Li estas fiera, ke nia gazeto estas kompare kun aliaj regule eldonataj kaj petas membrojn, ke ili pli multe skribu kaj sendu al li artikolojn kaj informojn pri niaj aktivecoj (kun fotoj). Kontrollegas lingve Éva Farkas kaj teĥnike Pavel Polnický.



## 12. Estrarelektoj –

Ĉi jare finiĝas la oficperiodo de Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Siegfried Krüger kaj Pavel Polnický. Ili estas reelekteblaj kaj tuj estis akceptitaj por 3-jara periodo. Els van Dijk demisiis kaj nove estis elektita Václav Pospíšil el Ĉeĥio. Estis reelektita, kun la danko, kontrolo komisiono Norbert Südland kaj Karl-Heinz Schaeffer.

13. Estis pritraktita la situacio de KELI kaj ĝia translokigo el Nederlando, nuligo ĉe la nederlanda Ĉambro de Komerco kaj **oficiala enskribo en Francio**. Samtempe la estraro proponis du ŝanĝojn en la KELI-statutoj: 1) necesas ke la sidejo estas en Francio je la adreso de la franca prezidanto, 2) la teksto pri la bazo de KELI. Ambaŭ estis akceptitaj.

De maldekstre: Els van Dijk, Siegfried Krüger, Pavel Polnický, Philippe Cousson, Samuel Gaillard, Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Bengt Olof Åradsson



## 14. Venontaj kongresoj.

En 2012 devus okazi ekumena kongreso, sed ĝis nun ne estas decido flanke de IKUE. Se ne venos ia konkreta, firma propono ĝis 31. 8 pri ekumena kongreso 2012 eble en Miskolc (HU) tiam ni organizos kongreson de KELI en Zöblitz (DE).

## 15. Diskuto kaj proponoj.

Karl Heinz Schaeffer raportis pri ekumena diservo kadre de UK en Kopenhago.

## 16. Philippe Cousson fermis la jar-kunvenon.

Protokolis

Pavel Polnický

Kontrolis

Els van Dijk  
Sieglinde Stamm.

# Henk de Hoog – Andreo Cseh 2

Redaktis Ed BORSBOOM, NL

***D**e Hoog sendis 1943-07-22 lastfoje dum la milito leteron al Cseh. La kapitulaco de la germana armeo en Nederlando okazis 1945-05-05. De Hoog reskribis al Cseh 1945-05-27 en longa letero, el kiu mi selektis partojn. Li pentris siajn travivaĵojn dum la vintro 1944-1945, kiun oni nomas “la malsatan vintron”. FLE estis la laborista e-a unuiĝo en Nederlando, Fine Ĝi Venkos la haga e-a klubo.*

Amsterdam, 1945-05-27

Al s-ro A. Cseh,

Nun kiam la poŝtaj interrilatoj evidente pliboniĝas, mi deziras repreni la kontakton kun Esperantujo. Mi forte esperas, ke vi kaj la familio Isbrucker bone trapasis la teruraĵojn de la lasta vintro.

De meznovembro ĝis mezfebruaro mi aliĝis al la “armeo de malsato”, kiu piede aŭ bicikle iris norden, por preni la necesajn vivrimedojn. Ĉiusemajne mi faris du-aŭ tritagan ekskurson kaj ĉiam revenis kun 50-80 kilogramoj da nutraĵo: terpomoj, tritiko, aveno, sekalo, panoj, brasikoj, kelkfoje iom da butero, viando kaj multe da pizoj kaj faboj.

Mi devas honeste konfesi, ke mi ĉiam renkontis honestajn kamparanojn. Nur du noktojn mi pasigis malantaŭ la bovinoj, kiuj estis malbonaj noktaj kunulinoj. Ili daŭre bruegas laŭ sengusta kaj maldeca maniero.

En la mezo de februaro fariĝis tro danĝere sur la stratoj kaj vojoj, kaj eskapinte kelkajn fojojn la avidajn ungegojn je larĝo de haro, mi decidis submergiĝi. Je la mezo de marto mi devis forsendi niajn du plej aĝajn infanojn pro manko de nutraĵo. Dum naŭ tagoj ili vojaĝis en ŝipo norden kaj post tri semajnoj ni ricevis sciigon el Winschoten, ke ili alvenis tie. Tio estas terura decido: forsendi siajn infanojn kiel la lignohakisto en la fabelo de “la Malgranda Fingrulo”.

Je mia bedaŭro mi konscias plene ke returne iri al Hago estas neeble, verŝajne eĉ por multaj monatoj. Tamen mi deziras renovigi la kontakton kun la Esperantomovado. Hieraŭvespere mi ĉeestis packunvenon de FLE, 200 personoj ĉeestis.



De maldekstre:  
Henry Lundin,  
**H. A. De Hoog**,  
Erik Carlén,  
Ivar Karlsson,  
Lennart Sundman

(el Nia Historio)

Faŭlhaber parolis, iu kamaradino Schröder kantis. La viktimoj el FLE estis rememorigitaj kaj honoritaj per unuminuta silento. Ni kune kantis “la Espero”-n, kortuŝa momento.

korajn salutojn, H. De Hoog

Hago, 1945-06-28

Al s-ro H. De Hoog,

Kun multa intereso mi legis vian leteron de la 27-a de majo kaj mi dankas pro viaj diversaj interesaj informoj. Mi gratulas al vi kaj via familio pro la liberiĝo kaj la bonŝanco, ke vi tiel bone sukcesis travivi la pezan vintron.

Ankaŭ ni sukcesis teni nin en vivo, precipe pro tio, ke ges-roj Isbrucker en la komenco de februaro iris bicikle al Nordholando, kie tiutempe loĝis ilia plej juna filino Noreto kun sia edzo kaj bebo. Ili revenis kun pezaj provizoj.

Koran dankon pro via detala raporto pri la FLE-agado. La Kristana Grupo en Hago antaŭ kelkaj tagoj havis kunvenon. Ankaŭ la restintaj anoj de Fine Ĝi Venkos.

Kaj nun pri Universala Ligo. Mi fervore eklaboris, ĉi tie mi sendas kelkajn tekstojn. Estas la projekto de la presota varbilo kaj la aliĝilo. Jes, oni povas diskuti pri principaj kaj teoriaj aferoj, sed la gravaĵo estas la farota laboro.

Estas bedaŭrinde, ke vi ne estas en Hago kaj ne povas reveni. Sed mi tamen esperas, ke vi post ne longa tempo revenos definitive ĉi tien.

kun amikaj salutoj, A. Cseh



# Membrigo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

## Kotizoj de KELI 2012

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI	16,00 EUR
per libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni ›Espero Katolika‹ pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni ›Dia Regno‹ pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	3,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje po jaro

### Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtgire al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, kaj menciui:  
por KELI-konto **kelk-p**  
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97  
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50  
Svedio: 74374-0  
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciui:  
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.  
Per via konto ĉe UEA kaj menciui: por KELI-konto **kelk-p**
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:  
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;  
☎ +36 302 000 306; ✉ [agnes@raczkevy-eotvos.com](mailto:agnes@raczkevy-eotvos.com)

---

Membrigo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa  
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

### Landaj kotizoj:

<b>Britio:</b>	15 GBP	
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006		Jean Bisset, 47 Airbles Crescent,
“Fellowship of British Christian		Motherwell, ML1 3AP;
Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino		✉ <a href="mailto:jean@bisset100.freeserve.co.uk">jean@bisset100.freeserve.co.uk</a>

- Bulgario** \*)  
 Peranto: S-ino Ivanka Kircheva  
 Stoyanova  
 P.O. Box 701, BG-9000 Varna  
 ☎ + 359 52 639628,  
 ✉ [ivanka\\_esperanto@abv.bg](mailto:ivanka_esperanto@abv.bg)
- Ĉeĥa Respubliko** kaj  
**Slovaka Respubliko** 250 CZK  
 Peranto: Pavel Polnický, Na Vinici  
 110/10. CZ 29 001 Poděbrady II,  
 ☎ +325 615 651,  
 ✉ [polnicky@quick.cz](mailto:polnicky@quick.cz)
- Estonio** \*)  
 Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,  
 EE-10502 Tallin,  
 ✉ [endel.ojasild@gmail.com](mailto:endel.ojasild@gmail.com)
- Finnlando** 30 EUR  
 Banka konto Sampo n-ro  
 800027-4306 454 "Suomen  
 Kristallinen Esperantoliitto".  
 Kasistino: Anna-Liisa Heikkinen,  
 Asiakkaankatu 2 A 82,  
 FI 00930 Helsinki,  
 ✉ [anna-liisa.heikkinen@netsonic.fi](mailto:anna-liisa.heikkinen@netsonic.fi)
- Francio** 25 EUR  
 CCP n-ro 10 456 15 U Paris,  
 "Franca Evangelia Esperanto-Ligo  
 (FEEL)". Kasisto: Samuel Gaillard  
 5 rue Maurice Ravel,  
 FR-63800 Courmon d'Auvergne  
 ☎ +33 (0)4 73 84 31 31,  
 ✉ [samuel.gaillard@ac-clermont.fr](mailto:samuel.gaillard@ac-clermont.fr)
- Germanio** 24 EUR  
 Evang. Darlehnsgenossenschaft  
 Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37  
 "Esperanto-Liga für Christen in  
 Deutschland e.V."  
 Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-  
 Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,  
 ☎ 02573 / 626,  
 ✉ [hetifisch@googlemail.com](mailto:hetifisch@googlemail.com)
- Hungario** \*)  
 Peranto: Irén Bagi, Baross u.  
 54/B.II.8, HU 1201 Budapest  
 ☎ 01 283 6566
- Japanio** 20 EUR  
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Korea Respubliko** 20 EUR  
 (aerpoŝte + 3 EUR)
- Nederlando** 20 EUR  
 (por membroj de KUNE +5 EUR)  
 Poŝtbankkonto n-ro 108 75 75  
 "Chr. Esperanto Verg. KUNE"  
 Kasistino: Gerda Dercks,  
 Molenstraat 20, 7607 AL Almelo  
 ☎ +31(0)546 819 403,  
 ✉ [gcamdercks@home.nl](mailto:gcamdercks@home.nl)
- Pollando** 30 PLN  
**Rumanio** \*)  
 Peranto: Maria László, OF1.C.P.  
 38 Exterior, 4800 Baia-Mare  
 ☎ 062 426182,  
 ✉ [laszlo\\_maria@yahoo.com](mailto:laszlo_maria@yahoo.com)
- Rusio** \*)  
 Peranto: Larisa Kuzmenko,  
 Kuŝvinskaja 25 A, 622013 N. Tagil,  
 Sverdlovskaja Obl. Rusio,  
 ✉ [klarisa8@yandex.ru](mailto:klarisa8@yandex.ru)
- Slovaka Respubliko** (vidu ĉe Ĉeĥa  
 Respubliko) \*)
- Svedio** 250 SEK  
 Poŝtĝirkonto n-ro 9 14 39-0  
 "Kristliga Esperantoförbundet"  
 Kasisto: Bengt Olof Åradsson,  
 Västergårdsg 15; S-256 64  
 Helsingborg; Svedio  
 ☎ +46 (70) 2004574;  
 ✉ [dr\\_board@yahoo.se](mailto:dr_board@yahoo.se)
- Svislando** 20 EUR  
 Pagu al la svislanda UEA-konto  
 (vidu supre)
- Usono** 30 USD  
 Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton  
 al la peranto: Jerald T. Veit, 3578  
 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207  
 ✉ [jeraldveit@yahoo.com](mailto:jeraldveit@yahoo.com)

\*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

# informejoj

## KRISTANAJ FONTOJ

### Karaj,

en la interreta portalo KRISTANAJ FONTOJ <http://fontoj.net/> legeblas pdf-formate la numeroj de 2005-1 ĝis 2010-5 de DIA REGNO: vera trezoro, kiun ni dankas al nia ĉefredaktoro, Bengt Olof Åradsson.

La arkivo de DIA REGNO estas atingebla tra la submenuoj “Trezorejo” aŭ “legi”, do: <http://web2py.dli-info.net/urban/es/artikel?id=959&schlagwort=Trezorejo> aŭ:

<http://web2py.dli-info.net/urban/es/artikel?id=959&schlagwort=legi>

Kun koraj salutoj al vi ĉiuj

Albrecht

--

ADORU, 1472 paĝoj, € 19,80

BIBLIO, 1376 paĝoj, € 19,80

KRISTANAJ FONTOJ: <http://fontoj.net/>



## Belan kristnaskan feston & Sukeesan novan Jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno  
deziras la sekretario & distribuanto  
kaj la redaktoro

*Pavel Polnický & Bengt Olof Åradsson*



\*\*\*\*\*  
Siegfried Krüger, Claūdiusweg 10, DE 74074 Heilbronn  
Tel. 07131 - 162688, E-Mail siegfriedkrueger@arcor.de  
\*\*\*\*\*

Estimataj samideanoj,

finiĝas nun mia kasisteco post pli ol 14 jaroj kaj mi dankas al vi por via subtenado.

Ben- kaj bondezirante salutas elkore  
Siegfried



## Rememore al Rie van der Kooij – Waal

ie (Marie Agatha) naskiĝis la 21-an de januaro 1920 en Amsterdamo sed la plej granda parto de ŝia vivo okazis en Hago. En tiu ĉi urbo ŝi forpasis la 23-an de oktobro 2011. Pro malfortiĝo ŝi unue transloĝiĝis al maljunulejo kaj poste al flegejo.

Rie eklernis Esperanton en 1963 per kurso en senpaga haga gazeto. Ankaŭ ŝia filino Madzy fariĝis aktiva esperantistino kaj tra patrino kaj filino kaj televidkurso konatiĝis bofilo Gerrit Berveling kun la Internacia Lingvo. Rie aliĝis al pluraj Esperanto-organizoj inter kiuj L.E.E.N. (nun Esperanto Nederland) kaj K.U.N.E./K.E.L.I. Ŝi partoprenis multajn naciajn kaj internaciajn kongresojn. En unu el miaj kongresalbumoj troviĝas fotoj de la Ekumena Kongreso en Augsburg (1985). Gerrit partoprenis kun la 2 filinoj, Freya kaj Etelka. Ĉar la patrino ne ĉeestis, prizorgis la avino Rie kun ama atento la manĝaĵojn de la nepinoj.

La dankdiservo por ŝia vivo okazis la 28-an de oktobro en la Remonstranta Preĝejo de Hago, ĝin gvidis Gerrit Berveling. Gerda Dercks ĉeestis, ŝi kondolencis nome de ni ĉiuj. Poste sekvis funebra ceremonio en la kremaciejo kaj reprezentis Rob Moerbeek la esperantistaron.

Ni perdis fidelan membrinon kaj sincere rememoras ŝin.

Els van Dijk



## Krist – nasko



*Oni kantas ke Kristo naskiĝas*

Sed ĉu Li ne mortos sub la premo  
De tiuj varoj komercendaj  
Ĉu Li ne bruliĝos sub tiuj fajroj  
Mil, kiuj brilas surbranĉe

*Oni kantas ke Kristo naskiĝas*

Kun la ĝojo de l'infanoj en la mondo  
Kun la fervoro de ĉiuj preĝantoj  
Flanke de l' rutinema negoc'  
Aŭ de tiuj kredantoj daŭre hezitemaj

*Oni kantas ke Kristo naskiĝas*

Ankaŭ en tiuj malriĉaj landoj  
Ankaŭ sub la varmaj steloj de nia hela nokt'  
Ankaŭ sine de l'sovaĝa kri'  
De tiuj, kun kiuj mi disdividus suferon

*Sed mi ja kantas ke Li naskiĝas*

Por vi, por mi, por l'aliaj  
Kiu ne kredas je tia fantazi'

Poemoj el Madagaskaro 29.12.06

FIDILALAO HENRIEL

Ambohidrapeto

Madagaskaro